

Rikardo ŜULCO (*1906-07-12 †1997-10-26)

”Revenis la 26-a de oktobro, datreveno de la forpaso de prof. Rikardo Ŝulco en 1997. Ne plu troviĝas atakemaj recenzoj kaj ofendaj legantoleteroj en la Esperanta gazetaro kontraŭ la batalema oldulo. Kaj mankas liaj respondoj. Domaĝe. Mi ŝatis legi ilin. En sia lasta libro ”Ĉirkaŭ la Skolo Analiza”, kies eldono efektiviĝis nur mallonge antaŭ lia morto, Ŝulco postlasis profundajn pensojn siajn pri la Internacia Lingvo, kvazaŭ kiel testamentaĵon de dumviva laboro – forme de artikoloj, recenzoj, leteroj, replikoj, admonoj, skizoj, respondoj...”

Tiel komenciĝis mia recenzo en Scienca Revuo 4/2000 pri la Ŝulca libro ”La Mago”, kolekto de pantunetoj, en versaĵaro, ornamita per aŭtoraj desegnaĵoj. Ne temas en tia libro pri fundament-defenda, gramatik-instrua tendenco, sed simple estas videbla la Ŝulca majstreco de esperantlingva poeziaĵo kune kun altvalora desegnokapablo. Tiam mi salutmemoris Rikardon Ŝulcon per tiuspeca pantuneto, en kiu rimoduopo estas pluportata de la antaŭa versaĵo al la venonta, kaj kies lasta linio identas kun la unua:

Li siajn pensojn malavare donis	Staranta firme sur la Fundamento
staranta firme sur la Fundamento.	pri nia lingvo zorgis li vivhorojn:
Aprobi ilin oni ne bezonis,	ĝojigis lin komprena komplimento
ĝojigis lin komprena komplimento	kaj amasigis li en ni trezorojn.

Pri nia lingvo zorgis li vivhorojn,
nelogikaĵojn tute ne pardonis,
sed amasigis li en ni trezorojn.
Li siajn pensojn malavare donis.

Memore al Rikardo Ŝulco, kiu ”siajn pensojn malavare donis” okazis, de la 6-a ĝis 10-a de oktobro 2007, konferenco en la Esperanto-Kasteleto en Tavoleto/Italujo, kun prelegoj, bild-ekspozicioj, muzikaĵoj, raportoj pri renkontiĝoj kun Ŝulco, prilingvaj diskutrodoj kaj kulturaj ekskursoj. Ni gaje festis la memoron pri esperantlingva verkisto, poeto, pentristo, filozofo kaj erudita scienculo. El la pensigaj poemoj kaj desegnaĵoj, gajaj kaj tristaj, pripersonaj kaj primateriaj, pri konfido kaj agonio, pri amo kaj morto – oni povas mediti post ĉiu ajn desegna kaj poezia kreaĵo. La kontribuoj por la memorkonferenco dediĉe al Rikardo Ŝulco okaze de la 10-a jardatreveno de lia forpaso kaj senditaj al la redaktoro de Scienca Revuo, nun aperas en tiu ĉi memorkaĵero kiel omaĝa saluto al granda kaj plenkora Esperantisto.

Rüdiger Sachs, prezidanto de ISAE

Dediĉe al Rikardo Ŝulco

Franz-Georg RÖSSLER

I. Rikardo Ŝulco, la mentoro kaj la amiko

Per la titola linio de tiu ĉi prelego mi omaĝis en la jaro 1989 komence de la tradukaĵo ”Momentoj el eterno“ al Rikardo Ŝulco, kiu estis vekinta mian intereson por Esperanto tiom, ke mi ĝis nun ne povis lasi la aferon.

El la hodiaŭa vidpunkto ja estas ĝusta la klasifiko ”mentoro“, sed mi dubas pri la vorto ”amiko“, kvankam li mem uzis ĝin. Ĝi tiam certe nur volis emfazi mian subjektive sentatan emocian rilaton al homo, kiu estis malferminta al mi (kaj same al mia edzino) tute alian mondon apud la ĉiutagaj realaĵoj. Por vera amikeco la distancoj estis tro grandaj: la geografia, la aĝa, la mentala. Tamen ni bone interrilatis kaj ne rare interagadis. Pri tiu rilato mi nun iom rakontu, ne pro tio, ke la biografiaj faktoj estus tiom gravaj, sed pro la produktoj, kiujn ili kreis kaj kiuj ne estus aperintaj publike, ne estus provokintaj foje publikajn reagojn, se tiuj ĉi rilato kaj interrilato ne estus estintaj. Kaj tiaj ili apartenas al la Esperanta historiografio.

Mi komencu per la biografia fono, kompletigu ĝin per mencio de la diversaj produktoj kaj eventoj. Fine mi limigu min al la muzika flanko de Rikardo Ŝulco, kvankam mi ŝatus ne nur tuŝi ankaŭ prilingvajn demandojn. Sed certe estas aliaj kompetentuloj, kiuj scias informi pri la libroj kaj la prolingva agado de nia aŭtoro. Same mi nur etakvante alparolos la beletran kaj poezian kapablojn, kiuj, kiel la jam menciitaj, meritis pli vastan rekonon. Post la morto de la omaĝito intertempe pasis dek jaroj. Sed Rikardo Ŝulco vivas ankoraŭ. Li pluvivas per sia laboro, per sia postlasaĵo.

Rilatoj kaj interrilatoj

Komenciĝo

Estis li per sia libro ”Mia amata Esperanto“, kiu survoĝigis min same kiel mian edzinon al vivo sufiĉe alia, ol ni tiutempe kutime vi vis ĝin. La tialoj devas esti konvinkaj, se homoj liberavole eniras tute ne-

konatan medion, precipe se ili troviĝas jam meze de la propra vivo. Mi ne dubas, ke vere nur tiu ĉi Ŝulca pedagogie lerta, tamen sobra enkonduko en Esperanton povis logi nin al la peno lerni novan lingvon, lingvon, pri kiu ni ne multon sciis kaj kiun la publiko ridindigis aŭ neglekteme, kiel tute nenecesan, traktis. Tiam dum du semajnoj avide mi legis kaj studis vespere la libron, ofte ĝis la plej profunda nokto. Poste mi ne nur estis konvinkita pri la fenomeno Esperanto, sed jam sufiĉe bone konis la strukturon kaj la leksikon de la lingvo. Preskaŭ kontraŭvole mi ne plu povis lasi la aferon – Rikardo Ŝulco estis montrinta novan mondon idean kaj lingvan. Mia edzino sekvis same entuziasme – ŝanco dezirinda al ĉiu Esperanta paro.

La hazardo ludis rolon, ne nur en la kontakto kun la libro “Mia amata Esperanto” en publika biblioteko. Du monatojn post nia per-Ŝulca aliro al Esperanto en 1985 okazis la 70a Universala Kongreso de UEA ĝuste nialande, en Aŭgsburgo. Tie ni unuafoje renkontis la geedzojn Ŝulco, afablan maljunan paron, kiu evidente ĝojis pri la videbla efiko de la Rikarda libro. Tiam ni pensis nur pri sola kongresa kontakto kun tiu fora klera aŭtoro, kiu estis liginta nin al la lingvo de d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhofo. Sed evidentiĝis, ke la enira vojo en idealan Esperantujon estis pli facile paŝebla ol tiu poste tra la veprejo de la uzata lingvaĵo Esperanto. Dum la unuaj sekvantaj jaroj ni ja fervore studis la Zamenhofajn verkojn kaj multege da lernolibroj kaj gramatikoj (ankaŭ plurajn neGermanajn), sed ni devis ekkoni, ke la uzado de Esperanto ne montriĝas tiom regula, senescepta, logika, kiom ĝi pretendis esti ne nur en nia unua lernolibro, la Ŝulca.

Instruado

En nia embaraso dum komenciĝanta propra verkado en la Lingvo Internacia, ni direktis nin al Rikardo Ŝulco. Kompetente kaj pacience li respondadis niajn demandojn, sed ankaŭ rekomendis kontakti Ludovikon Mimoo, kiu estis verkinta la ege instigan volumon “Esperanto por la jaroj du mil”. Kaj fakte tiu ĉi diligenta, fundema lingvisto (bedaŭrinde ĉiam ankoraŭ nekonata aŭ prisilentata de granda parto de la Esperantistaro) ne domaĝis sian tempon por korespondi kun ni. Neatendite li donace sendis al ni sian libron. Sed post du leteroj li silentis. Ni eksciis, ke Mimoo frue subite estas mortinta – laŭ la Ŝulca supozo deprimita pro la ignorado flanke de la Esperantistoj.

Cetere, ni instigis Rikardon Ŝulcon verki lernolibron laŭ la Mimeoaj (kaj liaj propraj) eltrovoj, pli koncizan kompare kun la originaloj kaj en formo pli bone komprenebla de ĝenerala publiko. Bedaŭrinde li ri-

fuzis fari tion. Certe li kunlaboris en la laboroj por la “Kompleta lernolibro de “Regula Esperanto – Komplementa volumo – Analiza skolo”, eldonita de Esperanto-Centro Paderborno. Ja meritoplena kaj necesega por scienca traktado, tiu libro ne povis atingi pli larĝajn rondojn. Por tiuj oni bezonas alian instrumaterialon. Ĝin verki Ŝulco, kvankam pasia instruisto, ne aliris. Eble li en sia aĝo timis tiun ĉi sisteman laboron, aŭ li devis konstati, ke li ne trovos vere konvenan koncepton. Entute li preferis agadi esee kaj artisme.

Post la morto de Mimoo, Rikardo Ŝulco preskaŭ sola devis transpreni la rolon de fidinda konsilanto en la kaoso de tradiciaj eraroj, diversaj skoloj, kapricoj, devojiĝoj ktp. ĉirkaŭ la Lingvo Internacia. Foje ni sendis al li niajn tekstojn por kontrolado. Afable, helpeme, tute ne orgojle kaj ĉioscie, li traktis la petojn, kiuj ja fakte detenis lin de propra verkado. Ni scias, ke li tiel korespondadis kun multaj homoj, ne nur kun adeptoj de la skolo Analiza, sed ankaŭ kun ties kontraŭuloj. Li konsilis, helpis, inspiris, argumentis, refutis, neniel postulis aŭ ordonis pro propra kapricemo. Liaj kutimaj finaĵoj de leteroj estis “Memdone via...” kaj “Abnegacie via...”.

Foje li tamen amare reagis, kiam kontraŭuloj facilanime, nekompreneble, eĉ malice streĉis liajn laborfortojn. Iam ankaŭ ni konstatis, ke ni ne plu rajtos peti de la maljuna Rikardo Ŝulco konsilojn, ke ne plu la rekta vorto helpas en dubaj kazoj, sed ke ni mem devos serĉi la ĝustajn solvojn, kiujn indikis la rekomendoj kaj atentigoj en la libroj de la skolo Analiza, al kiu Ŝulco mem ja multe estis kontribuinta. Ekzemple estu menciata nur lia “Pledo por unueca lingvo” kaj la multaj kajoroj en la Flava serio de la Esperantocentro Paderborno, kies direktoro Hermano Bermanno kiel redaktoro kaj eldonisto konsiderinde kontribuis al la disvastigo de la Ŝulcaj verkoj.

Renkontiĝoj

Iom post iom ni eĉ rezignis sendi salutoleterojn, ĉar Rikardo Ŝulco, afabla kaj edukita homo, ĉiam sentis la devon respondi al letero, ĉu grava aŭ nur konvencia. Oftaj vizitoj ĉe li ne estis eblaj, ĉar ni, Germanaj suduloj, nur rare povis viziti la familion Ŝulco. Nur tiam, kiam ni, vizitinte Svedajn Esperantoamikojn, reveturis hejmen, suden, niĝisveturis la Ŝulcan loĝejon. Ĉiam la geŜulcoj bonakore akceptis nin, kaj ni ne forgesos la babiladojn kaj la mangajojn.

Intencan vojaĝon norden al Mindeno en Vestfalujo ni entreprenis en 1996 por festi la 90-an datrevenon de la naskiĝo de Rikardo Ŝulco.


Estis evento la koron tuŝanta: Kvar membroj de la Alena Esperanto-grupo, la direktoro de la Paderborna Esperantocentro kun edzino (Hungara) kaj ni ambaŭ festis kun la geedzoj Ŝulco la maloftan jubileon. Krom la loka gazetaro nur tri Esperantaj gazetoj iel raportis pri la Ŝulca naŭdekjariĝo, ĉiuj surbaze de teksto mia. Memoru la diversajn ampleksajn omaĝojn al aliaj korifeoj flanke de la oficiala movado!

Ne okazis unufoje, ke mi sola devis raporti pri Ŝulcaĵo (kelkajn recenzojn mi skribis laŭmende de Esperantaj gazetoj, la maĵorion propravole), eĉ ke mi sentis min devigata foje publike defendi la homon, kiu estis prezentinta al mi la nefacilan honoron esti lia amiko. Kaj volonte mi defendis la poeton, pedagogon, scienciston, Esperantiston kontraŭ maljustaj akuzoj, kontraŭ kalumnioj, kontraŭ atakoj de iuj Esperantistoj malafablaj, lezemaj. Mi faris tion ne pro iu Teŭtona fideleco, sed pro honto pri tiu ĉi "rondo familia", pri tia devojiĝo de la Zamenhofa "sankta harmonio", por konservi en Movade almenaŭ iom da digno, honesteco kaj homeco. Supozeble tiu preskaŭ malsana malamikeco fontis en la almenaŭ subkonscia konscio, ke io vere ne estas en ordo aŭ en la nuna ĝenerala uzado de Esperanto aŭ en ies propra lingvaĵo, ke ĝi leviĝis pro la seniluziiga konstato, ke estas nur du vojoj por la estonteco de Esperanto: aŭ la (pli malfacila) reiro al la Zamenhofaj idealoj aŭ plue la volupta groteskigo de la Esperanta lingvaĵo kun gaja procesio abismen.

Eble mi estas tro malfrua Esperantisto, sed – pasintece kaj aktuale – nenie mi povis vidi en la historio de Esperanto tiajn akrajn, senindulgajn, malhonorigajn, detruemajn, kontraŭsamideanajn atakojn, kiajn devis suferi Rikardo Ŝulco, kvankam li nur defendis la bazan kodon, la esencon de la Zamenhofa elpensado, la internan "logikecon" de la Lingvo Internacia – la sola ekzistoraĵo de Esperanto apud la multego da etnaj lingvoj. La malhomeco, la akreco, la seninteligenteco de multaj atakoj certe trafis pli profunde, ol la verkisto tion malferme koncedis. Tamen li estis pli persista ol mi, li vidadis, montradis perspektivojn; kiel Esperantisto li ja devis esti esperema... sed kun tiaj "samideanoj"? Siajn malĝojajn emociojn esprimis Rikardo Ŝulco en la longa poezia teksto "La lamento de la Esperantisto" en la libro "La viro en la luno" (p. 354 – 355). Li klopodis resti afabla kontraŭ la plej aĉaj atakoj – sed neniu estas sanktulo. Jen malhela ĉapitro en la Esperanta historio. Tamen, se Esperanto vere estas transvivonta, nelaste, ja konsiderindakvante ĝi dankos tion al la klopodoj de Rikardo Ŝulco.

Talentoj

Trans la lingvikaj ellaboraĵoj la Ŝulca vivoverko konsistas el poeziaj libroj, dokumentantaj lian altan deziron esti rekonata kiel poeto. Esperantujo fieras, eĉ fanfaronas pri tiom da originalaj poetoj, kiom ajn efemeraj ili ja fakte estas. Rikardon Ŝulcon ĝi ĝis nun preskaŭ tute neglektas. "Propre poeto mi estas", li iam konfesis letere, "kaj la prilingvaj diskutoj, la disputoj rabas al mi tiom da tempo." Memdone Rikardo Ŝulco oferis la lastajn jardekojn de sia vivo al la krudaj prilingvaj demandoj, disponigante la rezultojn al la Esperanta komunumo, kvankam li profunde en sia animo vere estis artisto, ne nur sentis sin tia. Ke li poeto estis, tion la Esperanta publiko povas percepti



Rikardo Ŝulco kaj la aŭtoro (Aalen, 1991)

per liaj koncernaj libroj. Tie ĝi ankaŭ povas intimiĝi kun lia dua talento, la grafika/pentra. Tie li ne nur inventokapablon elmontras, sed ankaŭ sufiĉan teĥnikan kapablon. Bedaŭrinde nur malmultaj homoj povis ĝui kiel ni liajn grandformatajn pentraĵojn – ornamoj de la Ŝulcaj loĝejoj. Cetere, pri la bildarta kapablo de Rikardo Ŝulco mia edzino verkis referaĵon por la sama konferenco.

Pli marĝene, kvazaŭ "sekreta amo", troviĝas la muziko. Rikardo Ŝulco dum ne mallonga tempo kunlaboris kun *Felicitas Kukuck*, renomata Germana komponistino, liverante al ŝi tekstojn. Grandan muzi-

kan intuicion li montris tradukante por ni klasikajn kaj romantikajn kantotekstojn Esperanten, kiuj meritis publikan rekonon ne nur pro praktika utileco, sed ankaŭ pro la modele muzikkonforma, samtempe enhance fidela kaj prozodie ĝusta traduko. La nomo Ŝulco postrestos ankaŭ pro lia liverado de la teksto por kantato mia (“Evoluo”), per kiu, malgraŭ Esperanta teksto, la mendinta ĥoro gajnis en 1994 la unuan premion en la plej prestiĝa Germana ĥora konkurso.

Lastaĵoj

En recenzo pri lia libro “Vespero jam farigis” mi iam skribis: “Ankoraŭ longe daŭru tiu ĉi vespero.” Tiam almenaŭ dek jarojn Ŝulco povis plue verki, laŭ mi por la bono de Esperanto, eĉ se la majorio de la Esperantistaro estos konscia pri tio nur post certa tempo. Dum la lasta vizito ĉe Ŝulco li donacis al ni siajn muziknotojn, konscie, ke li mem ne plu estas bezononta ilin.

Baldaŭ poste atingis nin mesaĝoj malĝojigaj pri lia sanostato, pri rapida malfortiĝo. En la lasta tempo antaŭmorta Rikardo Ŝulco ĉiam pli suferis elĉerpitecon, sen ŝanco de refortikiĝo. Aparta portreto pentrita de Ŝulco, pendinta ĉe li hejme, iom konsolis nin. Ĝi estis indiko por lia vivokoncepto. Ĝi montras la paleontologon kaj teologon *Teilhard de Chardin*, kies komprenon de la naturo, de la celo de la kosmo (R. Ŝ. eksplicite agnoskis ĝin por si mem, kaj ankaŭ ni longatempe en tio sekvis), taksas tiun ĉi surTeran vivon nur transira.

Rikardo Ŝulco mortis en la aĝo de 91 jaroj. Nekrologo mia aperis laŭmende en la periodaĵo “La Gazeto”. Nia propra Germana gazeto “Esperanto aktuel” preferis elekti *Adolf Burkhardt* kiel oficialan adiaŭanton, kvankam estis konata ties antaŭa senindulga taksado de la Ŝulca “Mia amata Esperanto” kiel “aĉan kunmetaĵon plenan je eraroj, damaĝan al la Germana Esperanto-movado”. Ankaŭ UEA postmorte sukcesis bone kaŝi la esplorojn, la esperantologiajn laboraĵojn, la poemojn, la homon. En ĝia mizera enlistigo en la rubrikon “Nekrologoj” ĝi agnoskis Ŝulcon almenaŭ “atenta gardostaranto super nia lingvo, kiu ludis nepre bonfaran rolon, ĉar lingve konsciigan”. Kaj fino, konvencie, sen instituciaj sekvoj.

Sed la veron oni ne povas prisilenti. La logiko venkos la ĥaoson, jam senteble estas venkanta ĝin. Rikardo Ŝulco kaj lia verkado ne tute, ja tute ne malaperis de tie ĉi.

Fino

Kio postrestos de Ŝulco apud la artaj produktoj kampe de traduko (la Hungaroj konas la esprimon “*műfordítás*”, t. e. “arta traduko”, plene koncernantan la aŭtoron), poezio, pentrado kaj muziko? La ordinara publiko konas lin precipe pro liaj lingvistikaj verkoj. Iel, iom, sed ne vere ĝi konas lin. Ĝi pli konkrete devus scii, ke per siaj kristale klaraj analizoj li servis al la lingvokomuno multe pli, ol ĝis nun pli vaste estas konate. Sed nuntempe la ĝenerala aliro ne plu povas okazi rekte. Jen: tasko por la anoj de la “Skolo Analiza”.

Tamen, se ni rigardas ĉirkaŭ ni, intertempe la Esperanta lingvaĵo fariĝis pli klara, multaj strangaĵoj malaperis pro la Ŝulca agado. La esencon de la Zamenhofa kodo kaptas pli kaj pli la homojn. Fakte, ne ĉion ĉe ĉiu samatempe, samakvante, sed dise - eĉ ĉe iamaj kontraŭuloj. Vilhelmo Oldo ekzemple rekomendis la Esperantigon de propraj nomoj, Stefan Maul pli konscie uzas la tiel-tiom-komparadon, eĉ la foje stranga iama prezidanto de la Akademio de Esperanto, s-ro d-ro Albaŭlto (en anekdoto mi rakontis, kiel li premis min violente kontraŭ muron, asertante dum la premado, ke mi estas premita kaj ne premata...), emfazas la signifon de la logiko en racia internacia lingvo (!), la tempeca karaktero de la participoj estas pli klare komprenita, ekzemple de *Kurucz Géza* (Juna amiko) ktp. Eĉ la UEA-gazeto lingvumas pli konscie. Ŝulco ja efikis.

Sed mi devas konfesi, ke post lia morto ankaŭ mi sentis min iom senŝarĝita, ĉar ne ĉiam estis kaj estas facile sekvi la rigorajn ordonojn de la logiko kaj la modelojn de la korifeo. Kutimoj, malbonaj instruoj, pigreco ne lasas nin, ni ne sufiĉe distancigas nin de ili. En la ĉiutaga praktiko mi ne tro rigide Esperantigas proprajn nomojn, ne nepre konservas la majusklojn de la radikoj, ne konas ĉiujn Ŝulcajn -enofinaĵojn, kie mia sento simple sekvas la Germanan - ino-finaĵon, ne ĉiam zorgas pri kompleta lingva unueco. Tamen, principe ĝis hodiaŭ mi nur povas rekomendi kaj al komencantoj kaj al spertuloj la pri-lingvajn disertaĵojn de Rikardo Ŝulco. Se ni ĉiuj estus lernintaj laŭ liaj esploroj kaj rekomendoj, ni ŝparus multan tempon kaj parolus / skribus senprobleme (kaj sen akraj disputoj) pli koheran internacian lingvaĵon. Pli oni ne povas atendi en nia komplika, daŭre ŝanĝiĝanta mondo. Sed Ŝulco almenaŭ montris vojojn el nia interna lingva marĉo. Mi ne kultas al li, same kiel Ŝulco ne kultis al Zamenhofo. Tamen, ankaŭ post dek jaroj mi agnoskas, respektas, admiras la Ŝulcan vivoverkon kaj tute sobre esprimas, ke mi senhezite ne vidas kialon

ne resti idea kaj praktika ano de la skolo Analiza kaj, same sobre kaj sincere dirite, Ŝulcano, (laŭ la prelego dum la memoriga konferenco en Tavoleto aŭtune de 2007).

Ampleksa listo “Resumo de interrilatoj inter Rikardo Ŝulco kaj *Franz-Georg Rössler*“ aperis en la libro de *Franz-Georg Rössler & Rita Rössler-Buckel*: “Rikardo Ŝulco. Dek jarojn poste.“ *Edition Antiphon/Speyer/2007*.

II. Rikardo Ŝulco, la lingvisto kaj la homo

1. Rikardo Ŝulco kiel objekto de scienca konsiderado

Pasis dek jaroj post la morto de Rikardo Ŝulco. Evidentiĝis dum tiu ĉi tempo, ke lia verko apartenas al la plej gravaj kontribuoj de Germano al la lingvoprojekto Esperanto. Same evidentiĝas nun, ke liaj lingvaj studaĵoj multe efikis, sed ke junaj Esperantistoj jam ne scias multon pri liaj persono kaj verko. Rikardo Ŝulco ja memdone laboris por la lingvo Esperanto, sed modeste nek kreis ian “Fondaĵon Ŝulco“, nek propran skolon, kiuj gardus lian verkaĵon kaj diskonigus ĝin ankaŭ postmorte.

Principe la esenco de lia verkado estas alirebla laŭ liaj libroj en librovendejoj kaj bibliotekoj. Sed ĉiam ankoraŭ mankas kohera, profunda esplorado de liaj fonoj, fontoj, de la eksterEsperanta verkado, de la dokumentoj sekure postlasitaj aŭ postmorte ie (mal)aperintaj, samgrade fidinda listo de liaj verkoj en Esperanto kaj en aliaj vivofsferoj. Okaze de la memoriga konferenco en Tavoleto montriĝis dezirinda scienconivela, tamen ankaŭ al la ĝenerala publiko alirebla studaĵo kunprenanta ĉion, kio estas sciinda kaj konservenda por estontaj generacioj de Esperantistoj kaj ankaŭ lingvistoj pri la homo kaj la aŭtoro Rikardo Ŝulco.

Jen kolektiĝis por estontaj esploristo(j) listo de temoj ĉirkaŭ la persono Rikardo Ŝulco, ia “gvidlinio“, kiu helpu, baze de la ĝis nun konata materialo, disvolvi kaj eldoni vivo- kaj verkobildon. Multo jam estas farita kaj alirebla, sed komplementoj kaj plifundigoj necesaj, novaj eltrovoj ĉiam ankoraŭ eblaj. Certe dezirinda estas inda rondigo baze de ĉiuj aktualaj scioj.

2. Provo por indekso de priŜulca dokumentaĵo

I. La persono

Ĝenerala biografio:

- a) datoj, lokoj, personoj

- b) edukigo
c) bild-, son- kaj aliaj dokumentoj
ĉ) distingiĝoj
d) la diversaj membiografioj

Ideaj kaj praktikaj fonoj:

- a) edukado
b) propra biblioteko
c) vojaĝoj
ĉ) filozofiaj influoj
d) etika vivokoncepto

Apartaj trajtoj de R. Ŝ.:

- a) pentristo, grafikisto, artoŝatanto
b) muzikamanto
c) romanisto
ĉ) instruisto, docento
d) burleskulo / ekspresionisto

R. Ŝ. kaj la filozofio / religio:

- a) religiaj tekstoj (Germanaj / en la postlasaĵo)
b) por li modelaj personecoj:
Jesuo, Francisko el Asiso, Albert Schweitzer, Albert Einstein, Mahatma Gandhi, Teilhard de Chardin, Martin Luther King, Ernesto Cardenal (vd. lian “*Dankgebet*“)
c) vidu en “*Vespero jam fariĝis*“ k. s.

II. La verkoj Esperantaj

- a) Esperantologiaj
b) lingvosociologiaj
c) poezio
ĉ) prozo
d) artikoloj, leteroj, reagoj k.s.
e) eldonoj libraj (vidu listojn)
f) publikigaĵoj broŝuraj (“*Vestfaliaj Flugfolioj*“, “*Flava serio*“ k.a.)
g) tradukoj en / el Esperanto
ĝ) instruaj, analizaj, vortaristaj

III. En la Germana kaj aliaj lingvoj

- a) originaloj (pri Esperanto / pri aliaj temoj)
b) tradukoj, adaptoj, pluformadoj

IV. Ĉirkaŭ R. Ŝ.

Verkoj pri R. Ŝ. / Sekundara literaturo:

- a) resumoj de la ISAE-konferenco 2007
b) apartaj eldonoj de aliaj aŭtoroj
c) priŜulcaĵoj de Hermano Bermano
ĉ) artikoloj en diversaj E-gazetoj
d) diversajtoj

Kontaktoj kun personoj kaj institucioj:

- a) Hermano Bermano
b) konsiloj, instigoj al unuopuloj
(ekz. simpatiantoj de la Analiza skolo kaj multaj aliaj)
c) lingva helpo al aliuloj

- ĉ) AIS
- d) ISAE
- e) Fame-fondaĵo
- f) UEA
- g) Akademio de Esperanto

La Analiza skolo:

- a) kontakto kun Ludoviko Mimoo
- b) transpreno kaj pludisvolvo
- c) eldonoj

Ĝenerala efiko:

- a) kreo de novaj Esperantistoj
- b) influo al la ekster-Ea publiko
- c) efikoj intermovadaj
- ĉ) iama kaj aktuala rolo

Kontraŭ-Ŝulca agado:

- a) artikoloj
- b) leteroj ktp.

Postlasaĵoj de R. Ŝ.

- a) serĉado
- b) komuna indekso

Fontoj konsultindaj:

1. *Hermann Behrmann* kun siaj laboroj a) memstaraj b) kunlaboraj (entute ĉ. 300) semajnfinoj da komuna laboro pasigitaj kun R.Ŝ. Liaj libroservo kaj privataj E-libroj transiris en 2002 al *Lu Wunsch-Rolshofen en Berlin*, Germanujo, kie la Ŝulcaj eldonaĵoj ankoraŭ nun estas haveblaj.
2. La komisiito de la juĝejo en Mindeno, sinjoro *Hauptmann*, kiu "respondecis" pri la postlasaĵo.
3. *Karl Heinz Schaeffer* kun la kolekto de Ŝulcaj verkoj en la Urba biblioteko en *Aalen* (DE).
4. La eldonejo *Bleicher / Gerlingen*. Ties reston da E-libroj transprenis laŭdire la Urba biblioteko en *Aalen* (DE).
5. *Prof. Rüdiger Sachs*, kiu iom ricevis el la Ŝulca postlasaĵo kaj organizis la memorigan kongreson en 2007. (+ lia E-biblioteko)
6. *Franz-Georg Rössler*, kiu ricevis de Ŝulco muzikaĵojn kaj fotojn, disponas pri kelkaj neeldonitaj neEsperantaj tekstoj de Rikardo Ŝulco (interalie fruaj biografioj kaj poeziaj memportretoj) kaj laboris diversakampe pri li. (+ libro "Rikardo Ŝulco. Dek jarojn poste.")
7. Simpatiantoj de la Skolo analiza, kiuj estis en iela kontakto kun R. Ŝulco.
8. Diversaj malsimpatiantoj de Ŝulco, kiuj estis en kontakto kun li aŭ verkis pri li.
9. *Reinhard Haupenthal*, kiu laŭ ies sciigo estis post la morto de Ŝulco dufoje en Mindeno kaj eble kunportis iom el la postlasaĵo de Rikardo Ŝulco.

3. Sinjoro Ŝulco promenas

Dum vizito ĉe la geŜulcoj en la jaro 1994 komuna promonado estis sur la tagordo. Jam en 1969 li skribis en Franclingva poemo: "*Et chaque jour, je me promène. C'est bon pour la santé, on dit.*" ("Ĉiun

tagon mi promenas. Tio estas bona por la sano, oni diras."). Kaj Germanlingva poemo aludas: "*Gehe täglich um das Städtchen / einmal rings herum im Kreise*" ("Ĉiun tagon unufoje / ĉirkaŭiras mi l' urbeton. ").

Do, neniŭ demando pri promenado. Ĝi okazu kvazaŭ rito. Sed pri la vestoj la ĝentlemano decidis laŭ emo, celoloko kaj la vetero. Aparte grave estis, kiun apogilon li kunportu, ĉu simplan promenbastonon aŭ pompan pluvombrelon. Ke tiam sufiĉis simpla ligna bastono, tion pruvas fotoĵo farita de *Rita Rössler-Buckel* antaŭ la Ŝulca loĝdomo.

Jenan foton la fotintino en 2007 reprenis por arteca serio de variaĵoj. Ŝi utiligis tre diversajn eblecojn de la komputilo por esprimi siajn bildideojn laŭ la origina fotoĵo. La serion ŝi montris dum la priŜulca konferenco aŭtune 2007 en Tavoleto kadre de kelkaj aliaj siaj bildprojektoj en la teĥniko "diĝita grafiko".

Pri sia pluvombrelo Rikardo Ŝulco jam en 1969 verkis poemon en la Germana kaj la Esperanta lingvoj, sed ne aparte pri sia promenbastono. Sed en la lasta verso de tiu ĉi poemo la pluvombrelo kvazaŭ magie retransformiĝas en la instrumenton, kiu ĝi ja samtempe povas esti kaj kiun tiuĉibilde "*Don Ricardo*" (kiel li nomis sin iam kiel cirkan artiston) tenas enmane: promenbastonon ("La pluvofal' subite ĉesas. Baston' fariĝas ree ĝi. ").

La pluvombrelo de sinjoro Ŝulco

ŜULCO Rikardo: "La muzino" p. 417-418, 1991

Ho, honestul', por ke streĉite
 Mi ŝvebu super via kap',
 Malfaldu min, ke malfaldite
 Mi ŝirmu vin de l' pluvofrap'.
 De l' dista ocean' saluto
 Sub mia ŝirm' ĉirkaŭas vin.
 Mi estas grava atributo,
 Vin akompanas kun obstin'.
 Ho saŭro! Tuj post la angulo
 Atendas vin puŝeg' de l' vent'.
 Min firme tenu, promenulo!
 Torento kontraŭ silktegment'.
 Ve, via man' dolore premas.
 Kolere grincas spasme vi.
 Ni ambaŭ nin trapluve trenas.
 Eklamas nia energi'.

Mi sentas emon forflugadi.
 Ho, povus mi balono esti!
 Pli alten! Ĉiam pli strebadi.
 Ne ĉiam pintĉegrunde resti.
 La pluvofal' subite ĉesas.
 Baston' fariĝas ree mi.
 La flugaspiron mi forgesas.
 Ve, kiom malsekiĝis mi!


Ke tamen simpla bastono ĉe la geŝulcoj nemalofte memstare plenumis sian rolon, atestas alia frua Germanlingva poemo, kies kernaj linioj tradukiĝas Esperantlingve: “Ni svingas gaje niajn bastonojn, impertinentaj kiaj ni estas.” Jen la fota originalo kaj diĝita variaĵo de *Rita Rössler-Buckel*, pro praktikaj kialoj en nigra-blanka formo.



4. Manskribo de Rikardo Ŝulco (dediĉa poemeto)

En la jaro 1988 *Franz-Georg Rössler* sendis al Rikardo Ŝulco poemeton, kiu estis repliko al poemo de la Baltadevena literatura verkisto *Werner Bergengruen* (1892-1964). Ĝi kontestis ties optimisman rigardon al la estonteco de la mondo (“Neniu povas lezi la mondon, nur

grateti je la ŝelo...”; “novaj nuboj ardas en la foro...”), finante sian verketon per “Mondrestaĵoj forardantaj...”; “Anstataŭ novaj pintoj: abismo, morto.”



Rikardo Ŝulco reagis laŭ sia maniero: li komentis la poemeton de *Rössler* per propra poemo, kiun li enskribis kiel dediĉon en sian libron “Sur la vojoj de la Analiza Skolo”, donacitan al *F.-G. R.* (“Mindeno en Vestfalujo / 1988-01-31”).

Jen ĝi, originale kaj en Esperanta adapto de la ricevinto:

<i>Tod</i>	Mort'
<i>Abgrund</i>	abism'
<i>vermutlich</i>	probable
<i>total kaputt und...</i>	tuta pere' kaj...
<i>dennoch versuchen zu retten.</i>	tamen provadi la savon.

La kvin linioj havas striktan formon. Ĉiu sekvanta linio adicias la silabojn de la du antaŭaj, do 1 – 2 – 3 – 5 – 8. Kaj du estas rimitaj. La rimon ne eblas transpreni ĝustaloke en Esperanto, eble la anstataŭigo de la vorto “probable” per “ebla sort” (rimigiĝanta al “mort”) povus iel substitui la Germanan rimon inter “*Abgrund – und*”.

Enhavate la vido de *Bergengruen* estas tiu de filozofia optimismo, se ne de religia konvinkiĝo. La liniojn de la replikinto pregas agnoskemon kaj skeptikon. La poemeto de Ŝulco spegulas la puran teniĝon de

vera Esperantisto: ne esperi pro la konstato, ke la racio kontraŭas (“*Credo, quia absurdum*“.../ *Tertuliano*), sed fari la necesajon, ĉar ĝi meritas la provon. Dudek jarojn poste la Ŝulca poemo ricevis muzikan melodion kaj pianan akompanon:

... kaj tamen provadi la savon
dedica poemo (1988) de
Rikardo Sulco

Franz-Georg Rössler (2007)

kanto + piano

Mort! a - bism! pro - bab - le tu - ta per - e! kaj...

ta - men pro - va - di la sa - von

ripetado sen fino

(fino, se necese:)

ta - men pro - va - di la sa - von

Adreso de la aŭtoro

RÖSSLER Franz-Georg

Am Mönchsbusch 6

D-67373 Dudenhofen / Germanio

<rozsas@web.de>

Priaŭtoro informo

Gimnazia instruisto, verkas muzikaĵojn, tekstojn kaj bildojn. Esperantisto.

Noto pri la sciencoco de la Internacia Lingvo

Rikardo Ŝulco[†]

1. Tri precipe diferencaj vidpunktoj

Ekzistas tri diversaj apenaŭ interakordigeblaj **konceptoj pri la esenco de la Internacia Lingvo**. Malofte ili estis klare kaj penetre pripensitaj. Provante malimpliki ilin, oni trovas, ke ili reduktiĝas al principe tri vidpunktoj. Ni nomu ilin

- (1) **historiisma/evoluisma,**
- (2) **tradicieaj/dogmemaj,**
- (3) **analiza/scienca.**

2. Karakterizaĵoj

2.1 Laŭ la **unua koncepto** la Internacia Lingvo iel, ne tre gravas kiel, estiĝis kiel vivanta fenomeno kaj estas nun unu lingvo pli inter la aliaj. Ĝia bazo, la Fundamento (*Zamenhof*, 1963), faris sian devon, nun ĝi foriĝu! Ĝusta lingvouzo estas (demokratie) tiu de la plej multaj aŭ (aristokratie) tiu de la plej elstaraj parolantoj. Ĝi konformas al la ĉiuforte aktualaj kutimoj, kiuj konsistigas la sekvindan normon. (El letero de membro de la Akademio de Esperanto al Ludoviko Mimoo: “Mi estas profesia lingvisto. Sekve mi estas kutimiĝinta konsideri, ke la hodiaŭ tiel nomataj ‘eraroj’ morgaŭ fariĝas ‘reguloj’. Se ne estus tiel, se ni ne akceptus la rezulton de la uzado, ni ankoraŭ parolus Latinon aŭ eble pli fruan lingvon”).

2.2 Laŭ la **dua koncepto** la Internacia Lingvo estas difinita per ĝia triparta Fundamento, t.e. per la Gramatiko, la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro, al kiu apartenas ankaŭ la Antaŭparolo kaj al kiu aldoniĝas – kun certaj limigoj – tute ĝenerale la Zamenhofa lingvouzo.

Estas la tasko de la Akademio de Esperanto ŝirmi la netuŝeblecon de la Fundamento, akordigi, kio estas neakordigebla, nome la Fundamenton kun la Zamenhofa lingvouzo, sankcii lingvajn kutimoj, kiuj sufiĉe forte estas altrudiĝintaj, kaj laste, kiam aliaj rimedoj ne plu